

Espero Katolika



Numero 4-6/2014

Aprilo-Junio 2014



Sur la kovrilo: *La israela Prezidanto Peres, Papo Francisko, Patriarko Bartolomeo kaj la palestina Prezidanto Abbas en la vaticanaj ĝardenoj post la preĝo por la paco en Proksima Oriento (v. p. 35).*

ENHAVO

BERGOGLIO KAJ LA KRUCO

“ŝtelita” el la rozaria ĉeno de pastro Aristi 23

KIAM LA SANKTULOJ RIDETAS

La humurismo de Sanktaj Johano la 23-a kaj Johano Paŭlo la 2-a 24

LA DUA VATIKANA KONCILIO KAJ ĜIA SIGNIFO POR LA RILATO DE LA EKLEZIO AL LA JUDARO

Unua parto - La origino de la Dua Vatikana Koncilio 30

LA FORTO DE LA PREĜO

POR ATINGI PACON EN PROKSIMA ORIENTO 35

KANONIZADO DE DU PAPOJ

Johano la 23-a kaj Johano Paŭlo la 2-a 36

LA PAPO PRI SIA VOJAĜO AL SANKTA LANDO

24–26.05.2014 38

SUD-SUDANO: LA ESKAPO DE PASTRO RAIMUNDO

39

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoogroups.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H076010320000023290000 - BIC/SWIFT: BPPHITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>


Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

Bergoglio kaj la kruco “ŝtelita” el la rozaria ĉeno de pastro Aristi

“Mi forprenis per iom da forto la krucon de la rozaria ĉeno kaj mi preĝe alvokis al pastro José Aristi: Donu al mi la duonon de via mizerikordo”. La 6an de Marto, fine de la renkonto kun la romaj paroĥestroj, kiam li finis sian mediton pri la mizerikordo, kiun devas havi la pastroj, Papo Francisko faris konfidencan al sia pastraro. Li “konfesis”, ke li alproprigis al si kruceton el la ĉerko de maljunega kaj sankta konfesprento, tuj post lia morto.


Pastro José Aristi estis membro de la ordeno de la Sanktega Sakramento kaj dum sia tuta vivo li estis konfesprento en Buenos Aires. Al la romaj paroĥestroj Francisko memorigis, ke pastro Aristi estis fama kaj ke dum unu el siaj du vizitoj al Argentino Johano Paŭlo la 2-a petis konfesprenton kaj oni sendis pastron Aristi. Bergoglio estis helpepiskopo kaj ĝenerala vikario de la argentina ĉefurbo, kiam pastro Aristi mortis. Estis la Sankta Sabato de 1996: “La mate-



non de Pasko,” memorigis la Papo, “mi legis mesaĝon, en kiu oni diris: Hieraŭ, antaŭ la nokta viglado, forpasis pastro Aristi. Por la tagmanĝo, en la paska tago, mons-ro Bergoglio devis iri al la pastroj de la ripozdomo, sed post la manĝo,” rakontis la Papo, “mi iris al la preĝejo de pastro Aristi. Mi mal-

supreniris en la kripton, la pastro estis en la ĉerko, estis nur du maljunulinoj preĝantaj en angulo kaj neniu floro. Ĉi tiu viro, mi diris al mi, pardonis la pekojn al la tuta pastraro kaj nun ne estas floro por li. Tial mi supreniris, mi iris al surstrata florvendejo kaj mi aĉetis florojn, rozojn. Poste mi komencis aranĝi la ĉerkon per la floroj”.

“Tiam,” diris plie Francisko al la romaj paroĥestroj, “mi vidis la rozarian ĉenon, kiun la pastro havis en siaj manoj. Kaj tuj venis al mi penso – tiu ŝtelisto, kiun ni ĉiuj havas en ni, ĉu ne? – kaj dum mi aranĝis la florojn mi prenis la krucon de la rozaria ĉeno kaj per iom da forto mi deigis ĝin. Kaj en tiu momento mi rigardis al li kaj mi diris: Donu al mi la duonon de via mizerikordo. Mi sentis fortan senton, kiu donis al mi la kuraĝon fari tion kaj diri tiun preĝon! Poste mi metis tiun krucon ĉi tien, en la poŝon. La ĉemizoj de la Papo ne havas poŝojn, sed mi ĉiam kunportas malgrandan ŝtofanan koverton, kaj ekde tiu tago ĝis hodiaŭ tiu kruco



estas kun mi. Kaj kiam aperas en mi malbona penso kontraŭ iu, mia mano iras tien ĉi ĉiam. Kaj mi sentas gracon! Mi sentas, ke tio bonfaras al mi. Kiom da bono faras la ekzemplo de mizerikorda pastro, de pastro, kiu alproksimiĝas al la vundoj...”

Ekzistas sufiĉe fama fotografio de kardinalo Bergoglio farita dum li vojaĝis en la subtera fervojo de Buenos Aires, vestita per civila pastra vesto (v. EK 4-6/2013, paĝo 25), kun la dekstra mano enŝovita en la jakon. Verŝajne li tuŝis la etan krucon de la rozaria ĉeno de pastro Aristi, por ne pensi malbone pri la fotisto...

José Ramón Aristi, el eŭska deveno, naskiĝis Novembre de 1899. Li alvenis en Argentinon, kiam li estis ankoraŭ studento kaj eniris la ordenon de la Plej Sankta Sakramento. Li paŝtiste agadis en la Baziliko de la Sankta Sakramento en Buenos Aires. Li estis provincestro de sia ordeno por Argentino, Urugvajo kaj Ĉilio, kaj li ankaŭ instruis. Sed lia ĉefa agado estis konfesprenado, kun longa enviciĝo de fideluloj kaj pastroj, kiuj aliris al li por la forigo de la pekoj. Li estis ankaŭ muzikisto: li gvidis la ĥoron de la georfoj dum la liturgiaĵoj por la 32a Internacia Eŭkaristia Kongreso (Buenos Aires, 1934). Li havis specialan manieron por rilati kun malriĉuloj kaj li inspiris multajn sekvi la pastran vokiĝon. Laŭ la atesto de pastro Andrés Taborda, sakramentano, kiu hodiaŭ vivas en Romo, “Pastro Aristi kutimis doni la rozarian ĉenon kun la eta kruco, por ke la pentantoj tenu ĝin enmane dum konfeso; poste li uzis ĝin por la absolvo kaj fine li invitis kisi ĝin. Entute, tiu rozaria ĉeno kaj tiu kruceto estis atestantoj pri rivero da graco”. Pastro Taborda ĉeestis, kiam mons-ro Bergoglio prenis la kruceton: “Mi memoras, ke li diris: Li estis mia konfesprenanto, kun ĉi tiu rozario en la mano li absolvis multegajn pekulojn; ne eblas, ke li portu ĝin subteren.” Kaj tial la estonta Papo decidis preni ĝin, petante al la mortinta pastro Aristi iom da lia mizerikordo.

Prelego de Carlo Sarandrea, legita dum la Printempa Kunveno de la Itala Sekcio de IKUE (Vicenza, 17-18.05.2014)

KIAM LA SANKTULOJ RIDETAS

La humurismo de Sanktaj Johano la 23-a kaj Johano Paŭlo la 2-a

Estus granda pretendo voli realigi prelegon duonhoran, kiu diru ĉion pri du elstaraj sanktuloj: nur ilia surtera agado koncernis 30 jarojn de la historio de la Eklezio, kaj... kiujn jarojn!

Plie, estus preskaŭ teda faro prezenti longan liston de datoj kaj de eventoj pri ilia vivo, ĉar iliaj biografioj aperis en ĉiuj amas-komunikiloj – ankaŭ filmo-forme – okaze de ilia sanktproklamo kaj ni ĉiuj, pli malpli profunde, konas ilin, ĉar temas pri du Papoj de nia generacio.

Do, mi limiĝos proponi kelkajn anekdotojn, ligitajn al malpli konataj eventoj, kiuj povas fariĝi instigo por plua pristudo kaj ĉefe por medito pri la homa aspekto de Johano la 23-a kaj Johano Paŭlo la 2-a. Por ke ĉi tiuj 30 minutoj ne estu “leciono” sed momento, kiu povas estigi agrablajn sentojn, por des pli kreskigi nian agrablan rememoron pri la du sanktuloj.

Ni komencu de Papo Roncalli.



Ekzistas difino pri Sankta Johano la 23-a kontraŭ kiu, de pli ol duona jarcento, luktas lia pli deproksima kunlaborinto, lia sekretario kardinalo Loris Capovilla. Dum la pluraj intervjuoj al li faritaj okaze de la sanktproklamo, li rediradis: “Bonvolu, ne plu nomi lin ‘la papo bona’. Jes, la simplaj fideluloj vokis lin tiel, sed”, rimarkigis kardinalo Capovilla, “en la realo la ĵurnaloj uzis tiun adjektivon por humiligi lian papadon, kiu, male, estis tre grava por la Eklezio kaj la mondo, por la Koncilio, por la paco”.

Efektive, diri, ke iu difinita Posteulo de Petro estas la ‘papo bona’ povus signifi, ke ĉiuj aliaj estis ‘papo malbonaj’. Kaj plie, oni riskus limigi la rememoron pri li nur al kelkaj specifaj gestoj kaj frazoj pli ‘amaskomunikilaj’ – ekzemple, en la kazo de Johano la 23-a, la kareso al la infanoj – forgesante la kernan parton de lia paŝtista instruado.

Kiu scias, kiam naskiĝis tiu difino. Iuj diras, ke ĝi estis la frazo, kiu anstataŭigis balotajn propagandilojn ĉirkaŭ la lasta paroĥo de li vizitita. Iuj aliaj diras, ke la bonecon de Johano oni konstatis el la komparo kun la stilo de lia antaŭulo, Pio la 12-a. Sed ĉi tiu tezo tutcerte volas ne omaĝi al Johano, sed ankoraŭfoje malbone paroli pri Pio.

Krome ekzistas la opinio, ke la popola difino kunligiĝas kun la nomo de li elektita: “Johano” sonis por la oreloj “pli popolana” ol nomoj kiel “Pio, Benedikto, Leono, Gregoro”.

Li mem klarigis la motivon de sia nomelekto en sia unua parolado al la kardinaloj: Johano estis por li dolĉa nomo, ĉar ĝin havis lia patro, kaj ĝin havas la paroĥo, en kiu li estis baptita, kun multaj Katedraloj, plejmulto el ĉiuj Papoj: “preskaŭ ĉiuj havis mallongan papadon”, li aldonis profetece.

Papo Johano volis antaŭ ĉio esti paŝtisto. Kiam li prezentiĝis al la mondo la 4an de Novembro 1958, li diris, ke oni ne devas serĉi en li ŝtatiston aŭ diplomaton, nek scienciston aŭ organizanton de la socia vivo, sed paŝtiston. Samkiel lia vivo, ankaŭ liaj vortoj estis la apliko, preta kaj forta, de la evangelia instruo.

Simpleco, kiu konkeris la mondon, sed kiun li lernis el la polvoplenaj stratoj de la vilaĝeto, en kiu li naskiĝis. Por esti precizaj: la nomo de

lia naskiĝloko estas Brusicco, por kelkaj kvartalo de Sotto il Monte, por aliaj strato, en kiu staras la preĝejo, en kiu li estis baptita.

El sia tero li portis al la sojlo de Petro “du okulojn kaj rideton”.

Hodiaŭ estas Papo Francisko: lia deziro “havi Eklezion malriĉan kaj por la malriĉuloj” kaj tuja empatio kun la homoj, memorigas Roncalli’n. Ankoraŭ kardinalo Capovilla konfidis: “Bergoglio pensis elekti la nomon



Papo Johano kun (dekstre) sia sekretario, la nuna kard. Capovilla

Johano, li volis esti posteulo de Johano la 23-a. Poste li parolis kun la brazila kardinalo Damasceno Assis, kiu konsilis al li alpreni nomon, kiu parolu al la malriĉuloj, kiu parolu pri malriĉeco. Tial Bergoglio elektis la nomon Francisko. Sed Papo Johano estis en liaj pensoj, kaj verŝajne, dum kelka tempo, li pensis nomi sin Johano la 24-a.”

Roncalli estas en la pensoj de Bergoglio ankaŭ koncerne la simplecon de rilatoj kun la renkontatoj.

La matenon de la 27a de Marto 2013 en la vatikana Baziliko, kardinalo Angelo Comastri, ĉefpastro de la Baziliko, ĵus finis la celebron de la Meso por la vatikanaj laborantoj, kiam Papo Francisko aperis el unu el la flankaj pordoj, por bondeziri bonan Paskon al la ĉeestantoj. Li komencis sian alparolon aludante humuraĵon de Johano la 23-a pri la laborantoj de Vatikano. Iun tagon oni demandis Papon Angelo Roncalli: “Via Sankteco, kiom da personoj laboras en Vatikano?” Kaj li, ridante, respondis: “Pli malpli... la duono”. Papo Bergoglio, rememorante tiun spritaĵon, komencis sian saluton dirante: “Kaj do, ĉu vi estus tiu duono?”.

Johano la 23-a ĉiam havis en sia koro la destinon de la vatikanaj laborantoj kaj plaĉe interrilatis kun ili.

En tiuj jaroj, kiam Papo promenis en la vatikanaj ĝardenoj, neniu povis renkonti lin, eĉ ne rigardi al li: la Papon oni ne devas ĝeni. La laborantoj, do, aŭ devis foriri aŭ kaŝiĝi. Sed iun tagon la Papo estis en la ĝardenoj kun la direktoro de la vatikanaj Muzeoj. Ĉi-lasta ekvidis fine de la aleo la ĉefĝardeniston, toskanan komuniston. La direktoro rigidiĝis pro la timo: “Ho ve, tiu ulo ne foriras”. La ĝardenisto kaj Johano la 23-a renkontiĝis: la unua ne kisis la manon de la Papo, sed nur manpremis lin kaj diris: “Plezuron, mi nomiĝas...” kaj li diris sian nomon. La Papo respondis: “Plezuron, mi estas 23-a Johano”.

Kun Papo Roncalli la vatikanaj laborantoj estis liberaj labori ankaŭ, kiam Lia Sankteco estis en la ĝardenoj. Tio ĉi validis, post kiam oni respondis al lia simpla demando: “Kial en la ĝardenoj mi neniam vidas iun, kiu laboras?”.

Kiam estis okazo por danki iun laboriston, kiu faris por li ian prilaboron, li ĉiam diris al sia sekretario: “Mi rekomendas tion: donu al li sanktulbileteton, sed el tiuj, kiuj utilas por aĉeti florbukedon por la edzino”. Kaj tio signifis, ke la “sanktulbileteto de la Papo” devis esti monbileto de 5.000 aŭ 10.000 italaj liroj.

Johano la 23-a efektive ŝatis amuze uzi la difinojn. Iun vesperon li eliris el Vatikanon (onidire, private kaj sola) por atingi la apudan hospitalon Sankta Spirito kaj viziti, sen krei sensaciaĵon, iun pastron, lian amikon, kiu es-



Ankoraŭ papo Johano kun sia sekretario en la vatikanaj ĝardenoj

tis tie kuracata. Lia neanoncita alveno estigis iom da agitiĝo, ĉefe ĉe la monaĥinoj, kiuj tiam konstante deĵoris en la italaj hospitaloj. Informita pri la grava vizito, la superulino de la monaĥinoj alkuris al la Papo, kaj senspira kaj emociplena ŝi salutis lin jene: “Via Sankteco... mi estas la superulino de la Sankta Spirito”. Kaj la Papo: “Feliĉa Vi... Mi estas nur la servisto de la servistoj de Dio”. (Aliaj fontoj citas la frazon jene: “Mi estas nur la Vikario de Kristo”).

Kiam li estis Nuncio en Francio, dum publika regalado oni prezentis al li la Ĉefrabenon de Parizo, kun kiu monsinjoro Roncalli komencis plaĉan interparolon. Je iu punkto ĉiuj ekiris al apuda salono. La Ĉefrabeno ĝentile invitis la Nuncion iri antaŭ li, dum Roncalli, senapombe, respondis: “Bonvolu: unue, la Malnova Testamento...”.

Dum alia regalado en Parizo li sidis apud sinjorino, kiu estis eleganta, sed kun tro vasta dekoltaĵo. Kiam oni havigis la deserton, li proponis al ŝi pomon, invitante ŝin jene: “Prenu ĝin, sinjorino. Eva, post manĝo de pomo, konsciis, ke ŝi estas nuda kaj vestis sin”.

Je ĉi tiu punkto, parolante pri la restado de Roncalli en Parizo, ni iom menciis la lingvajn problemojn kiel decas ĉe esperantistoj. Tiu ĉi estas verŝajne plia komuna karakterizo de Johano kaj Francisko. Papo Roncalli iom malofte uzis aliajn lingvojn krom la itala. La samon faras Francisko, kies alparoloj estas ĝis nun grandparte faritaj en la itala (por ne paroli pri la ne plu okazantaj plurlingvaj bondeziroj Urbi et Orbi).

Angelo Roncalli jes klopodis lerni lingvojn, kiam li estis seminariano. Iu instruisto pri la angla pretis ŝanĝi la horaron de siaj lecionoj, por ebligi al li plenumi – dum la kutimaj lecionhoroj – sian servadon kiel kelnero dum la manĝoj en la porpastra seminario. “Je la fino mi rezignis”, konfesis Roncalli, pro ne kapablo lerni. La nekono de aliaj lingvoj influis. Komence de sia servado kiel Nuncio en Parizo, finante paroladon, li diris: “Je vous fais mes meilleurs vœux!” anstataŭ “Je vous fais mes meilleurs voeux!”. Tradukite: “Mi prezentas al Vi miajn plej bonajn ŝafidojn”, anstataŭ “dezirojn”.

Daŭrigante kiel esperantisto, mi aldonu, ke Johano la 23-a jes salutis la esperantistojn. Tio ĉi okazis, kiam la kongresanoj de IKUE en 1962 iris por aŭskulti lin en Kastelgandolfo. Bedaŭrinde ilia fortega aplaŭdado, tuj post lia mencio pri esperantistoj, “kovris” liajn vortojn. Por eviti similan efikon, kiam la IKUE-kongresanoj en 1975 iris aŭdienco al Paŭlo la 6a, ili ricevis la ordonon ne aplaŭdi... Sekve, longa silento akceptis la vortojn de Papo Montini (estonta beatulo) al la esperantistoj.

Permesu, ke mi – daŭre parolante kiel esperantisto – esprimu ĉi tiun mian tezon. Angelo Roncalli estis ordinita pastro la 10an de Aŭgusto 1904 en la Preĝejo Sankta Maria de Monte Santo en placo del Popolo (de la Poplo). Italoj verŝajne tuj rememoras ĝin, se oni mencias ĝian kromnomon: la preĝejo de la artistoj, ĉar en ĝi okazas liturgiaĵoj kun kaj por ili. Nu, en tiu preĝejo aktivis komence de la 20a jarcento esperantista pastro, monsinjoro Luigi Giambene, la unua roma esperantisto de Romo. Eble li ĉeestis dum la pastraj ordinoj. Ne eblas scii tion, ĉar tiu preĝejo ne plu estas paroĥo, kaj ĝiajn registrojn oni portis aliloken.

Ni revenu al la komenco de la papado de Johano la 23-a.



La unua beno al Romo kaj al la mondo

Tuj post la elekto oni kondukis lin al la “ĉambro de la larmoj”, tio estas, al la sakristio de la Siksta Kapelo. Tiu ĉambro tiel nomiĝas, ĉar en ĝi la novelektita Papo surmetas la papajn vestaĵojn kaj oni supozas, ke li ekplore gas pro la kortuŝiĝo kaj pro la pezo de la nova respondeco.

Neniu el la tri vestaĵoj – kiujn oni kutime pretigas antaŭe laŭ tri dimensioj (malgran-

da, meza kaj granda) – perfekte adaptiĝis al Roncalli. La ceremoniestroj, per pingloj kaj kudriloj, zorgeme laboris por alĝustigi veston sur lia korpo, tiom ke Papo Johano ekkriis: “Mi bone konstatas, ke la kudristoj ne volis, ke mi estu Papo”.

Lian humilan kaj liberan spiriton oni perceptas ankaŭ el konfidenco, kiun li faris al siaj kunlaborantoj: “Ofte okazas, ke mi vekigaĵas nokte kaj komencas pensi al serio da gravaj problemoj kaj mi decidis paroli pri ili kun la Papo. Poste mi komplete vekigaĵas, kaj mi rememoras, ke estas mi la Papo”.

Ofte li diris: “Ĉiuj povas fariĝi Papo. Tion pruvas la fakto, ke mi fariĝis Papo”.

Ankoraŭ pri lia humileco. Franca episkopo parolis kun li pri lia parolado, kiu inaŭguris la 2-an vaticanan Koncilion kaj la Papo sciigis al li: “Vero estas, ke en la inaŭgura parolado mi ne rimarkis tiom da aferoj, kiom poste, studante ĝin, trovis la episkopoj. Oni vidas, ke la Sankta Spirito estas pli preparita ol mi”.

Humileco kaj kompato por la problemoj de la mondo estis en li ununura afero. Kiam oni lanĉis la unuan raketon al la Luno, la ĵurnaloj publikigis la informon grandtitole. Li limiĝis komenti kun siaj pli intimaj kunlaborantoj, dum li skuis malrapide sian kapon: “Sed sur la tero estas multo por fari, multo por fari!”.

Al Johano la 23-a, samkiel al liaj posteuloj, plaĉis eliri el la vaticanaj muregoj por viziti malsanulojn, enkarcerigitojn, la romajn paroĥojn: sed li estis la unua Papo de la 20a jarcento, kiu faris tion. Foje, kaŝe, kun la komplaceco de sia privata domhelpanto, kiu disponigis porokaze sian aŭtomobilon. Kaj la romanoj nomis Roncalli’n ameme: “(Sankta) Johano ekster la muregoj”, vortludante kun la titolo de kelkaj romaj Bazilikoj, starantaj ekster la urbaj muregoj.

Kaj iun tagon, ĝuste reveninte el privata vizito al maljunulejo, lia aŭtomobilo veturis fronte al domo “en kiu – diris al li monsinjoro Capovilla – loĝas profesoro Lolli, redaktoro de L’Osservatore Romano. Lia edzino estas tre malsana. Ĉu vi ne povus havigi al ŝi vian benon?”, demandis monsinjoro Loris. La Papo respondis: “Estas malfacile havigi benon tra la aero. Ĉu ne estas pli bone alporti ĝin per-

sones?” Kaj sen antaŭa informo, kiel li faris ofte, li frapis al la pordo de la domo por persone beni la malsanulinon.



Papo Roncalli vizite al enkarcerigitoj

Alian benon – kiun kortuŝe memorigis la iama Ĉefrabeno de Romo, d-ro Elio Toaff – li donis al grupo de hebreoj, elirantaj el la sinagogo, dum lia aŭtomobilo transpasis ĝin. Ni konsciuj pri la signifo de ĉi tiu faro, en epoko, kiam de nemulte Johano nuligis la preĝoformulon: “oremus pro perfidis judeis” (Ni preĝu por la nekredemaj hebreoj).

La lasta beno de Papo Johano la 23-a estis tiu, kiun li donis mortante. “Ut unum sint”. Ke ĉiuj estu unu.

La rilato de la katolika Eklezio kun la hebreaj fratoj tuj portas nian penson al Johano Paŭlo la 2-a, kiu eniris Sinagokon, la unua Papo post Petro (kaj ni ne komencu debati ĉu Petro estis Papo).

La viziton inspiris la antaŭa renkonto, kiun Johano Paŭlo la 2-a havis kun delegacio de la romaj hebreoj en la paroĥo de Sankta Karlo ĉe Catinari (kuvofaristoj). Ĉi tie mi enkondukas plian esperantistan mencion: tiutempe en la paroĥo de Sankta Karlo ĉe Catinari paŝtiste

agadis la esperantista, lombardia pastro Carlo Musazzi, redaktoro de la E-lingvaj elsendoj de Radio Vatikana. La historio ripetigas.

Ploris la roma Ĉefrabeno Toaff, kiam li eksciis, ke li estas unu el la nur tri personoj menciitaj en la testamento de Johano Paŭlo la 2-a.

Pri Johano Paŭlo la 2-a certe oni ĉefe rememoras la jarojn de lia malsaneco, kiuj plej profunde impresis onin. Pro tio mi finas mian tekston menciante liajn frazojn rilate al sanstato.

Jam en 1993, kiam li falis, kaŭzante al si luksacion de la dekstra parto de la ŝultro kun la sekva devo porti gipsaĵon, li ŝercis jene: “Vin salutas la Papo, kiu estas iom handikapita, sed kiu estas ankoraŭ kompleta kaj ankoraŭ ne mortis”.




13.04.1986: Johano Paŭlo la 2a kaj la roma ĉefrabeno Toaff

Dum la postaj jaroj li komencis uzi bastonon por paŝi, kaj ĝi fariĝis “eduka rimedo”, kiam li turnosvingis ĝin por substreki kelkajn proprajn dirojn aŭ kiam li klare diris al ĵurnalistoj: “Mi devus uzi ĝin kontraŭ iuj el vi”.

Iun vesperon, episkopo Álvaro del Portillo, de Opus Dei, atendis esti akceptita aŭdienco de Papo Johano Paŭlo la 2-a. Kiam li vidis lin, li rimarkis, ke la Papo trenis siajn piedojn; pro tio, komencante sian saluton, li diris: “Kiom laca Vi estas, Via Sankteco!” sed Johano Paŭlo la 2-a respondis tuj: “Se en ĉi tiu vespera horo la Papo ne estus laca, tio signifus, ke hodiaŭ li ne plenumis sian devon”.

Post ĥirurgia operacio ĉe la kokso Johano Paŭlo la 2-a loĝis en Kastelgandolfo por la konvalesko. Li ricevis viziton de usona episkopo, kiu rediradis al li, kiom sanstata li aspektas. Eĉ li diris: “Sankta Patro, mi konstatas Vin pli bonfarta ol tia, kia vi estis antaŭ la operacio”. Kaj la Papo rebatis: “Nu, Ekscelenco, diru al mi: kial entute ankaŭ vi ne submetiĝas je la sama operacio?”.



Sed pri sia efektiva sanstato li fine konfesis: “Se mi deziras scii ion pri mia sano, mi devas legi la ĵurnalojn”. Kiu scias, ĉu li amuze aludis la troigojn de ĵurnalistoj, aŭ ian silente-mon de liaj kunlaborantoj...?

“Oni multe priekzamenas min ĉi tie (en Polikliniko Gemelli): oni esploras ankaŭ organojn, kies ekziston mi ne konis”.

Ni scias, ke, okaze de la lasta enhospitaligo en Gemelli, oni decidis fari al li trakeotomion, por ke li povu pli facile spiri. Johanon Paŭlon la 2-an tre ĉagrenigis la ideo, ke li ne povos plu paroli dum kelka tempo. Tial la papa kuracisto, d-ro Buzzonetti, diris al li: “Via Sankteco, vi vidos: ĝi estas simpla operacio”. Kaj Wojtyła, kiu ne perdis sian humuran stilon, rebatis: “Ĉu

simpla? Por kiu?”.

Humuro uzata ankaŭ por precizigi detalojn. Kiam ili iris aŭdienco al Johano Paŭlo la 2-a, episkopoj de Proksima Oriento alportis al li brikon, kiu, laŭ la tradicio, apartenis al la hejmo de Abrahamo. La Papo fiksitis la rigardon al ĝi kaj ridetante ekkriis: “Kaj, imagu: se oni demandus tion al mi, mi respondus, ke Abrahamo vivis en tendo”.

Uzi humuraĵon ankaŭ por komprenigi flankajn aferojn. Kiam iu kardinalo demandis sian tiaman kolegon kardinalon Wojtyła, ĉu estas vere, ke li skias, iras al montaro, biciklas, naĝas, la estonta Papo konfirmis, ke tio estas vero. Tial la maljuna kardinalo rebatis: “Mi ne taksas tion agado kongrua kun Princo de la Eklezio”. Kaj Karol respondis: “Nu, en Pollando 50 procentoj de la kardinaloj praktikas ĉi tiujn agadojn”. Kaj tiutempe en Pollando estis nur 2 kardinaloj: li kaj la Ĉefepiskopo de Varsovio.

Dum sia lasta celeburo de la festo de la Korpo de la Sinjoro, kiun li prezidis en 2004, Johano Paŭlo la 2-a ne plu povis paŝi nek stari, tiel ke estis necesaj specifaj aranĝoj, por ke li povu resti en la veturilo uzata por la procesio. Fronte al li, supre, estis la hostiujo kun la Sanktega Sakramento. Post la ekveturo li demandis la ceremoniestron ĉu li povas surgenuiĝi, ricevante la respondon, ke tio estus tro riska, ĉar la pado ne estis glata, kaj tio reduktis la stabilecon de la veturilo. Post kelkaj minutoj,



la Papo ripetis: “Mi deziras surgenuiĝi”, kaj la ceremoniestro diris al li: “Bonvolu atendi, ĝis kiam la strato fariĝas glata”. Sed tuj la Papo


humile insistis: “Tie estas Jesuo ... bonvolu, mi petas...”.

Jes: indiki la vojon al Jesuo. Ĝi estas la ĉefa tasko de ĉiuj paŝtistoj. Kaj por fari tion, ĉiuj el ili ne evitis aŭ evitas uzi metaforojn, allogajn kaj amuzajn frazojn, por ke la mesaĝo estu pli facile akceptata ĉe multaj. Ni sincere agnosku, ke ni bezonas ankaŭ tion.

Mi finas memorigante, ke samkiel Sanktaj Johano la 23-a kaj Johano Paŭlo la 2-a, multaj aliaj Papoj (kaj ekleziuloj) estis humoristoj. Tio ĉi povus esti temo de alia prelegeto. Kaj ĝis la realigo de tia ĉi prelego, mi salutas vin per lasta anekdoto pri la ŝercemo de Papo, lige kun – kiel plaĉas al esperantistoj – lingvaj miskomprenoj.

Ŝajnas, ke Papo Leono la 13-a, dum sia lasta vivoperiodo, travivis problemojn kiam li vizitis... necesejon. Iun tagon pilgrimuloj el la itala diocezo Pescia (elparolu: Peŝa) iris al li. Oni scias, ke tiutempe la formalaj interparoloj

de kurianoj kun la Papo okazis en la latina. Tial, lia sekretario anoncis al Papo Leono la alvenon de tiu grupo da pilgrimuloj el Pescia



dirante latinlingve: “Piscia, Beatissime Pater”. Ĉar la latinlingva vorto Pescia sonas tute egale al la itallingva verbo “pisi”, Leono, tre trankvile, respondis: “Utinam...”.

Se oni ne rememoras, kion signifas la latina vorto Utinam, sciu, ke ĝi egalas al: “volu Dio”.

Hans Hermann Henrix

La Dua Vatikana Koncilio kaj ĝia signifo por la rilato de la eklezio al la judaro

Unua parto

Hans Hermann Henrix, emerita akademia direktoro, estas konsilanto de la papa komisiono por la religiaj rilatoj kun la judoj kaj honora profesoro de la Universitato Salzburg.

La artikolo estas traduko de lia prelego, kiun li faris okaze de la 50-jara jubileo de la koncilia malfermo en Oktobro 2012 en la benediktanina abatejo Mariendonk/Niederrhein. Tial ĝi ankoraŭ ne povis trakti la situacion post la elekto de Papo Francisko.

I. La origino de la Dua Vatikana Koncilio

1. Anonco kun gravaj konsekvencoj

Kiam Papo Johano la 23-a nur kelkajn semajnojn post sia elekto al papado (elektita la 28-an de Oktobro 1958, mortinta la 3-an de Junio 1963) per parolado al malgranda rondo de kardinaloj la 25-an de Januaro 1959 en la benediktana monaĥejo ĉe la roma baziliko de sankta Paŭlo ekster la muregoj anoncis koncilion kaj tio konatiĝis ekstere, la katolika mondo tuj estis elektrita. Ankaŭ la kristana ortodoksularo kaj la protestanta mondo montris sin interesitaj kaj atentemaj. Sed en la juda mondo okazis preskaŭ neniam reagoj aŭ monstroj de intereso. Tio estis komprenebla. Kiel intenco de la koncilio ja estis diskutataj antaŭ ĉio interna

reformo de la eklezio kiel ankaŭ la dialogo kun la aliaj eklezioj. La juda ne-interesiteco samtempe estis atesto pri la tiama granda manko de rilatoj inter la eklezio kaj la judaro.

Kontraste al la juda neintereso, en la katolika eklezio regis animstato, kiu montriĝis surprizita kaj nepreparita. Certe ekzistis ankaŭ la elemento de indigno, de suspekto kaj timo. El noto en la taglibro de la Papo oni povas konkludi, ke la reago de la kardinaloj al la papa anonco de la koncilio en la roma benediktana monaĥejo estis embarasita silento, se la Papo skribas:

Laŭ homa menso Ni atendis, ke la kardinaloj, aŭdinte Nian anoncon, estus arĝintaj

ĉirkaŭ Nin, por esprimi siajn konsenton kaj bonajn dezirojn. Anstataŭ tio okazis pia kaj impresema silentado.

Evidente Johano la 23-a estis esperinta je spontanea konsento kaj je bonaj deziroj al la koncilia projekto ĉe siaj plej intimaj kunlaborantoj. Tiu espero estis seniluziigita. Kaj tamen la Papo ne lasis sin deflankigi de sia projekto de koncilio.

2. koncilio ne estis atendebla

Kiam Papo Johano la 23-a anoncis sian projekton de koncilio, la lasta koncilio estis okazinta antaŭ preskaŭ 90 jaroj. Inter episkopoj kaj teologoj ja grandparte regis la ideo, ke la “dogmigo” de la papa primaseco kaj ĝia neraripovo pere de la Unua Vatikana koncilio de 1869/1870 faris konciliojn superflujaj. Kaj fine de la 1950-aj jaroj ne ekzistis eksplicita atendemo aŭ sopiro je koncilia prezento de la unueco de la eklezio. koncilio ne estis atendebla. La historia situacio de la 1950-aj jaroj ne donis favorajn kondiĉojn por la anonco kaj realigo de koncilio. Por tio oni indikas precipe du kaŭzojn. Tiam politike regis la “Malvarma Milito” kun ĉiuj siaj sekvoj de necerta situacio de la mondo kaj la minaco de eskalado al “varmegaj konfliktoj”, kiel okazis ĉe la hungara ribelo de 1956 kaj en la laŭŝtupa pliintensiĝo de la kreskanta tensio inter oriento kaj okcidento pro la konstruado de la Muro en Berlino en 1961. La politika situacio de la mondo estis karakterizita de klimato de malkonfido inter la

blokoj; aldoniĝis malkonfido interne de la popoloj de la orienta bloko. La politika situacio forte limigis la komunikadon kaj la liberecon de vojaĝado. La dua kaŭzo konsistis en senmoveco kaj mem-fiksiĝo en la tiama katolika eklezio. En ĝi alestadis – kvankam ne ekskluzive, sed tamen karakterize – atmosfero de mondo-timo kaj animstato de malfeliĉego.

Neniu malpli elstara ol Johano la 23-a en sia fortoplena parolado je la inaŭguro de la Dua Vatikana koncilio la 11-an de Oktobro 1962 priskribis la agordon de la tiama eklezio jene:

En la ĉiutaga plenumo de Nia apostola pastoralo ofice okazas, ke kelkfoje malĝojigas Nian orelon la voĉoj de tiaj personoj, kiuj ja brulas pro religia fervoro, sed ne allasas sufiĉan senton por la ĝusta prijuĝado de la afero, nek prudentan decidon. Ili ja opinias ekkoni en la hodiaŭaj cirkonstancoj de la homa societo nur pereon kaj malfeliĉegon.

Senĉese ili parolas pri tio, ke nia tempo kompare al la pasinteco daŭre malsupreniĝis al pli malbona. Ili kondutas kvazaŭ ili estus lernintaj nenion el la historio, kiu estas instruanto de la vivo, kaj kvazaŭ en la tempoj de antaŭaj koncilioj, en rilato al la kristana instruo, la moralo kaj la libereco de la eklezio, ĉio estus okazinta honeste kaj prave. Sed Ni havas tute alian opinion ol tiuj profetoj de l' malbonsanco, kiuj ĉiam aŭguras la malfeliĉegon, kvazaŭ la mondo starus antaŭ la pereco.



Aldoniĝis, ke en evoluo dum jarcentoj ĉiam pli klare rezultis centraligo de ĉia potenco en la manoj de la Papo. En la lastaj jaroj de la pontifikado de Pio la 12-a (1939 – 1958) estis evoluinta atmosfero de malvarmo kaj rigido. Ekleziaj historiistoj parolas pri “tenace aŭtoritatisma regad-stilo de la Pacelli-pontifikado” aŭ “patosa sintenado” de Pio la 12-a. Iniciatoj kiel la eksperimento de la pastroj-laboristoj estis traktataj restrikteme. La ekuvena movado estis tenata malproksima. Malagrabla sento kaj skeptikeco parte estis tiel fortaj, ke ne malmultaj teologoj kaj katolikoj post la pap-elekto la 28-an de Oktobro 1958 ne atendis multon de la nova Papo Johano la 23-a; ili pritaksis lin, rigarde al lia agado kiel nuncio en Parizo, prefere kiel “gajan diletanton”, kiu per sia konservativismo ne movos multon. Per sia anonco de koncilio nur tri monatojn post sia elektiĝo kiel Papo, Johano la 23-a des pli surprizis tiujn rondojn. Kaj aldone li konsternis multajn.

3. La nova koncilio kiel frukto de papa decideco

El la vortoj de la anonco de la koncilio evidentiĝas okulfrapa decideco kaj rezoluteco. Johano la 23-a enkondukas en sian anoncon de koncilio per la konstato de “firma decido je reaktualigo de kelkaj tradiciaj formoj de la instru-proklamado kaj saĝaj instrukcioj de la eklezia disciplino”; li mem uzas per la anonco de la “Ekumena koncilio por la tuta eklezio” la formulon “humila decideco en firma intenco”. Tiu akcentado fakte ne permesis dubon pri la seriozececo, ja definitiveco de la papa projekto.

La papa rezoluteco al koncilio staris en okulfrapa kontrasto al eklezia baza agordo, en kiu koncilio ŝajnis esti ekstreme malproksima. Kio movis Johanon la 23-an fari decidon ŝajne tiel malaktualan kaj samtempe tiel gravan? Tiu demando multfoje okupis la ekleziajn historiistojn. Li venis al ĝi – tiel unu klarigo – “pro historiaj prijuĝoj kaj intuicio al la kredo-situacio”, kiuj estis formiĝintaj en li dum la sperto daŭranta tri jardekojn kiel vatikana diplomato. De 1925 ĝis 1934 la ekleziulo, naskiĝinta la 25-an de Novembro 1881 kiel Angelo Giuseppe Roncalli, estis apostola

delegato en la ortodoksa Bulgario – tasko, kiun li plenumis poste de 1935 ĝis 1944 en Istanbul kaj tiel en islama ĉirkaŭaĵo. Tie li koncentriĝis al pastoralaj bezonoj, antaŭ ol li estis vokita kiel nuncio al Parizo de 1944 ĝis 1953. Ankoraŭ dum lia tempo kiel nuncio en Parizo, la 12-an de Januaro 1953 li estis promociita de Pio la 12-a al la rango de kardinalo, por enoficiĝi la 15-an de Marto 1953 kiel patriarko en Venecio.



Patriarko Roncalli kredeble konsideris tiun oficon, kiun li transprenis en la aĝo de 71 jaroj, kiel sian lastan stacion. Li estis trapasinta tre diversajn kontekstojn de siaj spertoj: en Bulgario li spertis la ortodoksan kristanisman; Istanbul estis historia centro de la tiam sekulariĝanta Turkio; en Parizo li konatiĝis kun la riĉeco kaj fermentado de malnova eklezio. Ĉion ĉi li travivadis kun profunda sento por la historio de la kredo. Samtempe tio preparis lin por lia ofico kiel patriarko kaj kvin jarojn poste kiel episkopo de Romo kaj Papo, kaj inkludite en tio, por la iniciato de la koncilio. La granda fakulo pri la pontifikado de Johano la 23-a kaj la Dua Vatikana koncilio, la itala eklezia historiisto Giuseppe Alberigo, konstatas: “Inter la elekto (je Papo) de la 28-a de Oktobro (1958) kaj la alparolado de la 25-a de Januaro (1959) ekzistas vico da pli malgrandaj indikoj ..., en kiuj Johano la 23-a ofte nur alude konatigas sian propran intencon instigi koncilion. Nur unufoje ŝajnas, ke la Papo faris konsultiĝon pri tiu demando, nome la 20-

an de Januaro 1959, kiam li ‘sufiĉe heziteme kaj necerte’ informis (kardinal-)ŝtat-sekretarion (Domenico) Tardini pri la ‘programo de la pontifikado’”, en kies centro staras la ekumena koncilio. “Johano la 23-a ricevas por tio la plenan kaj liberigan konsenton de Tardini.”

La ideo pri la kunvoko de koncilio estas la frukto de persona konvinko de la Papo, kiu malrapide evoluis en li, kiu trovis konfirmon ankaŭ de aliaj kaj kiu fine en la kvaronjaro post la elekto al papado fariĝis deviga kaj ne-revokebla decido.

El pli postaj eldiroj de la Papo oni povas ekkoni la informon, ke li mem atribuis la penson pri koncilio al subita inspiro. Li sentis, “kiel la ideo de koncilio unue neatendite ekfloris en nia koro kaj kiel la simpla vorto ‘Ekumena koncilio’ venis trans niajn lipojn”. Kredeble oni povas kompreni la originon de la penso pri koncilio kiel interligon de spontanee aperanta inspiro kaj maturiĝo okazanta tra pluraj stacioj. Ĉe tio la interparolado de la 20-a de Januaro 1959 kun kardinal-ŝtat-sekretario Tardini kaj ties konsenta reago havas propran kaj gravan signifon. Johano la 23-a ja komprenis la konsentan reagon kiel “signon de la volo de la Sinjoro”. En la momento de la interparolado, kiu fortigis lian decidecon kaj rezolutecon, li ankoraŭ ne havis plenmaturan koncepton pri la koncilio. Tiu koncepto estis formulita kaj precizigita en progresanta klarigo. La klarigo havis sian gravan antaŭkondiĉon en la papa intenco, doni al la koncilio precipe paŝtistan taskon. Ĝi servu “al la eklumigo, edifo kaj ĝojo de la tuta kristana popolo kaj al renovigita invito al la kredantoj de la disigitaj komunajtoj”. En tiu senco ĝi fariĝu “paŝtista koncilio”, sen proklamo de novaj dogmoj kaj sen anatemoj. Papo Johano la 23-a parolis pri la koncilio kiel “nova Pentekosto”.

4. La Dua Vatikana koncilio kiel komenco de io nova

En la unuaj monatoj post la anonco de la koncilio oni diskutadis inter la teologoj, ĉu tiu nova koncilio daŭrigu la Vatikanan koncilion de 1869/70, kiu formale ne estis fermita, aŭ ĉu temu pri memstara kaj nova koncilio. La

Papo finis tiun diskuton per decido, kiun li dokumentis per enskribo en notlibron la 4-a de Julio 1959:

Reveninte hejmen (post vizito al la vaticanaj ĝardenoj), mi bontrovis, ke la nun preparata ekumena koncilio meritas esti nomata Concilio Vaticano Secundo, ĉar la lasta koncilio okazigita de Papo Pio la 9-a portis la nomon Unua Vatikana koncilio – Vatican le premier.

Per tio estis konfirmita la memstareco kaj sendependeco rilate al la koncilio de Pio la 9-a, kaj la nova koncilio metita en malferman horizonton de la aktualeco aŭ de la “aggiornamento” (ĝisdatigo). Per tiu nocio Johano la 23-a karakterizis sian intencon kaj esperon, ke la eklezio, la kredo kaj la kristana vivo estas “afero de hodiaŭ”. Ke per tio, malgraŭ ĉia kontinueco, estas celata ankaŭ diferenco kun la antaŭa fazo de la eklezia vivo, klarigas la ekumena teologo Otto Hermann Pesch:

En la ‘Pia erao’ la renkonto kun la ‘mondo’ kaj la ‘tempo’ estas precipe konfrontado, ĉe Johano ĝi estas dialogo. Antaŭ Johano la mondo estas kontraŭula, eĉ malamika provoko... Ĉe Johano la mondo estas la demandanta mondo, al kiu la eklezio ŝuldas helpan respondon. Tial antaŭ Johano la eklezio estas Societas perfecta, la ‘perfekta socio’, kiu havas ĉion, kion ĝi bezonas... Kun Johano la ideo, ke la eklezio devas elmeti sin al pridemandado fare de la mondo, la unuan fojon ne plu estas rekte obscena.

Fariĝis libera koncilio. La ĉ. 2500 episkopoj kolektiĝintaj en la koncilia aŭlo de la baziliko de sankta Petro – alveninte parte timidaj – pli kaj pli postuladis la liberecon de la parolo kaj de la interkomunikado, intencitan de Johano la 23-a. Kardinalo Walter Kasper en ĵusdate prezentita bilanco de 50 jaroj post la inaŭguro de la koncilio, esprimis ĉi tiun opinion:

La fakto ke ĝi (la koncilio) okazis, evidentiĝas, ke la eklezio ne estas absolutisma monarĥa institucio, sed kiel Communio estas esence orientigita al komunikado.

Tiu ĉi komunikado okazadis en la koncilia aŭlo, tute vigle kaj dissenteme. Konceptoj de la preparaj komisionoj, kiuj parte estis forte determinitaj de la membroj de la kurio,

en la unua sesio de la 11-a de Oktobro ĝis la 8-a de Decembro 1962 estis parte emfaze kritikataj kaj rifuzitaj aŭ submetitaj al funda revizio. La Papo nomumis “kunordigan komisionon”, kiu daŭrigu la koncilian laboron en la intersesia tempo kaj ellaboru direktivojn por reviziaj prilaboradoj. Kiam Johano la 23-a mortis la 3-an de Junio 1963, aperis la demando pri la daŭrigo de la koncilio. La necerteco tamen estis rapide forigita per la decido de la sekvinto sur la papa trono. La 21-an de Junio 1963 kardinalo Giovanni Battista Montini, ĉefepiskopo de Milano, estis elektita Papo. Li donis al si la nomon Paŭlo la 6-a. Kelkajn tagojn post sia surtronigo Paŭlo la 6-a ordonis la rekomencan de la koncilio kaj la daŭrigon de la koncilia laboro. Tiel do ek de la 29-a de Septembro ĝis la 4-a de Decembro 1963 okazis la dua sesio.



La tria sesio de la 14-a de Septembro ĝis la 21-a de Novembro 1964 havis troŝarĝitan tagordon kaj fariĝis la fazo de granda krizo de la koncilio. Malfacilaĵojn kaŭzis la diskutadoj pri la teksto pri la eklezio, sed ankaŭ pri la temo de la religia libereco resp. pri la koncepto pri la rilato al la judaro. La sekvanta sensesia tempo estis utiligita por la reviziado de pluraj tekstoj, kiuj poste estis prezentitaj al la kvara kaj lasta sesio de la 14-a de Septembro ĝis la 8-a de Decembro 1965, dum kiu ili estis diskutataj kaj de la koncilio akceptitaj. En la solena fino la episkopa asembleo povis ririgardi al granda laboro de la Dua Vatikana koncilio: ĝi akceptis kvar konstituciojn, nome pri la Dia Revelacio (Dei Verbum), pri la eklezio (Lumen Gentium), pri la liturgio (Sacrosanctum Concilium) kaj pri la rilato de la eklezio al la

hodiaŭa mondo (Gaudium et Spes). El la tri akceptitaj deklaraĵoj, tiuj pri la religia libereco (Dignitatis Humanae) kaj pri la sinteno de la eklezio al la nekristanaj religioj (Nostra Aetate) estis fintraktitaj nur post intensa kaj ankaŭ dissentema luktado. La naŭ akceptitaj dekretoj formis arkon ekde la episkopa paŝtista tasko ĝis la ordena vivo, ekde la sacerdota servo ĝis la apostolado de la laikaro kaj ekde la misia agado ĝis ekumenismo.

Kun la Dua Vatikana koncilio la unuan fojon la eklezio iĝis videbla kaj spertebla kiel monda eklezio. Ĉe la Unua Vatikana koncilio la episkopa asembleo estis ankoraŭ “episkoparo de eŭropaj misiaj episkopoj, eksportita al la tuta mondo”. Sed el la iama “eŭropa-okcidenta eklezio kun eŭropaj eksportoj al la tuta mondo” en la momento de la Dua Vatikana koncilio fariĝis monda eklezio. Ties partaj eklezioj tra la kontinentoj fariĝis memstaraj, formis hejmlandan klerikaron kaj troviĝis en procedo de la enradikiĝo en la kulturon de sia lando. Kaj la koncilio videbliĝinta monda eklezio komencis forigi la liturgian latinan kultan lingvon, kiu estas tiel profunde ligita al la eŭropa kontinento. **En la tempo de post la Dua Vatikana koncilio la partaj eklezioj spertis kaj praktikis sian memstarecon precipe en la elformado de liturgioj en siaj respektivaj naciaj lingvoj. Per tio komenciĝis la akceptado de interna plureco kaj multformeco interne de la eklezio.** El tio fontis multaj aliaj konsekvencoj. La eklezi-interna vigla multformeco montriĝas teologie. Tiel la teologio ne plu estas determinita de la monotoneco de ĉie instruata nov-skolastiko, kiu restas ligita al la mezepoka pensado, sed lasas la parolon al multaj voĉoj por la ekzegezo de la kredo. La koncilio forlasis la longe montritan konfronteman sintenon precipe en siaj tekstoj pri la rilato de la eklezio al la mondo, pri la rilato al la disigitaj eklezioj, pri la sinteno al la nekristanaj religioj kaj al la religia libereco. Ĝi sekvis la postsignojn de la ĝenerala savintenco de Dio trans la murojn de la katolika eklezio. En speciale efika maniero la koncilio faris tion en la sinteno al la judaro. Tiu tre speciala ekmoviĝo meritas esti prezentata en sia origino kaj efikado.

Tradukis: Klaus PERKO (daŭrigota)

Historia momento, neforviŝebla bildo: la preĝorenkonto en Vatikano kun Francisko kaj la prezidantoj de Israelo kaj Palestino, Shimon Peres kaj Mahmoud Abbas, je la ĉeesto de la Patriarko de Konstantinopolo Bartolomeo, kaj de la gardanto de la Sankta Lando, pastro Pizzaballa. La preĝalvokoj reeĥis en diversaj lingvoj, sed ĉiuj celantaj peti pacon en Proksima Oriento.

LA FORTO DE LA PREĜO POR ATINGI PACON EN PROKSIMA ORIENTO

En eta angulo de la vaticanaj ĝardenoj la 8an de Junio 2014 Francisko, Ŝimon Peres kaj Mahmoud Abbas preĝis unu apud la alia. Tri diversaj momentoj el granda emocio, por danki Dion de la Kreaĵaro, por peti pardonon, por alvoki la pacon, post la ĉirkaŭbrakoj de la Papo kun la du ŝtatestroj kaj inter ĉi-lastaj. Paco inter la popoloj, rediris la hebreoj, la kristanoj kaj la islamanoj, per siaj preĝoj; pacon en Sankta Lando, diris per siaj paroladoj la Papo kaj la du prezidantoj.

“Mi esperas, ke ĉi tiu renkonto estu irado je la serĉo de tio, kio unuigas, por superi tion, kio dividas” diris Francisko, “renkonto akompanata de la preĝo de multegaj personoj”, el religioj, kulturoj kaj patrujoj diversaj, sed kiuj preĝis en momento, aldonis Papo Francisko, “kiu korespondas je la arda deziro de tiuj, kiuj sopiratendas la pacon kaj revas mondon, en kiu la viroj kaj virinoj povu vivi kiel gefratoj,

ne kiel kontraŭuloj aŭ malamikoj”.

“Sinjoroj prezidantoj,” li aldonis, “la mondo estas heredaĵo, kiun ni ricevis de niaj prauloj, tio estas vere, sed ĝi estas ankaŭ prunto de niaj gefiloj: gefiloj, kiuj estas lacaj kaj elĉerpitaj de konfliktoj kaj kiuj deziras atingi la tagiĝon de la paco; gefiloj, kiuj petas al ni faligi la murojn de malamikeco kaj trairi la vojon de la dialogo kaj de la paco, por ke amo kaj amikeco triumfu”.

Tiuj gefiloj falis sub la frapoj de milito kaj perforto, kaj rememore pri tiuj gefiloj, por ke ilia sinofero ne estu vana, Francisko petis al siaj gastoj havi “la kuraĝon de la paco, persisti en la dialogo ĉiukoste kaj havi la paciencon teksi la pli kaj pli fortikan interplektaĵon de kunvivado respektama kaj paca”.

“Por realigi la pacon,” daŭrigis la Papo, “necesas kuraĝo, multo plia ol por la milito. Necesas kuraĝo por diri jes al la renkontiĝo kaj



Abbas, p. Pizzaballa, la Papo kaj Peres

ne al kunpuŝiĝo; jes al dialogo kaj ne al perforto; jes al intertraktado kaj ne al kontraŭeco; jes al la respekto de la paktoj kaj ne al provokoj, jes al sincereco kaj ne al hipokriteco. Por ĉio tio necesas kuraĝo, granda animforto”.

Por atingi la pacon, do necesas la helpo de Dio. La Papo memorigis, ke la historio instruas, ke la nuraj fortoj de la homoj ne sufiĉas por atingi la pacon; el tio fontas la urĝeco, “ke ni ĉiuj levu la rigardon al la Ĉielo kaj agnosku nin filoj de unu Patro”. La Papo sekve konkludis per preĝo por peti la propeton de la Dipatrino kaj por ke la vorto “pacon, ŝalom, salam” fariĝu stilo de nia vivo.

Elkoran dankon al Francisko pro la realigo de la renkonto en Vatikano adresis ĉu Shimon Peres ĉu Mahmoud Abbas, kiuj, laŭvice, faris sian paroladon. La israela prezidanto, kiu difinis la Papon “konstruanto de pontoj de frateco kaj de paco”, levis sian preĝon, redeklarante la neceson, ke ĉiuj klopodu por atingi la pacon, ankaŭ koste de sinoferoj kaj kompromisoj, celante ĝin ankaŭ, kiam ĝi ŝajnas malproksima, por alporti ĝin al la gefiloj, ĉar tiu ĉi estas la sankta devo kaj misio de la gepatroj: “Du popoloj, la israelanoj kaj la palestinanoj,” memorigis Peres, “daŭre arde deziras la pacon. La larmoj de la patrinoj super siaj gefiloj estas ankoraŭ markitaj en niaj koroj. Ni devas ĉesigi la kriojn, la perforton, la konfliktadon. Ni ĉiuj bezonas pacon. Pacon inter egaloj”.

La realigon de la vero, de la paco kaj de la justeco en Palestino petis Mahmoud Abbas,

ĉar “la palestina popolo – islamanoj, kristanoj kaj samarianoj – deziras justan pacon, dignan vivon kaj liberecon, prosperan estontecon en libero en suverena kaj sendependa ŝtato”.



Plantado de olivarbo en vaticanaj ĝardenoj

Abbas citis Johanon Paŭlon la 2an, kiu diris: “Se la pacon oni realigas en Jerusalemo, pri la paco oni atestos en la tuta mondo”: “Tial ni petas al Vi, Sinjoro, la pacon en Sankta Lando, Palestino kaj Jerusalemo, kune kun ĝia popolo. Ni petas Vin igi Palestinon kaj Jerusalemon aparte sekura tero por ĉiuj kredantoj kaj loko de preĝado kaj kultado por la sekvantoj de la tri unudiaj religioj”.

Per la vortoj de la Papo kaj de la du prezidantoj finiĝis la preĝorenkonto por la paco en Proksima Oriento, sigelita de la pacogesto de elkora ĉirkaŭbrako kaj de la plantado de olivarbo de paco en la vaticanaj ĝardenoj, memorige pri evento el historia graveco.

Kanonizado de du Papoj – Johano la 23-a kaj Johano Paŭlo la 2-a

Du Papoj Sanktaj, du kuncelebrantaj Papoj. En ĉi tiuj ses vortoj enestas la tuta eksterordinareco de historia tago por la Eklezio, de festo de la kredo kaj de espero por la homaro. Ekde la tagiĝo de la 27a de Aprilo 2014, amaso da fideluloj – almenaŭ 800 mil personoj – ariĝis en Placo Sankta Petro por la Meso, dum kiu estis sanktproklamitaj Johano la 23-a kaj Johano Paŭlo la 2-a. Pli ol 800 estis kuncelebrantoj kun Francisko; inter ili – senprecedenca evento – estis la emerita Papo Benedikto la 16-a, akceptita de longa aplaŭdo, kiam li atingis la ŝtuparon de la Baziliko.

La latinrita rito por la sanktproklamoj komenciĝis per la trifoje ripetita peto al la Papo de kardinalo Angelo Amato, prefekto de la Kongregacio por la aferoj de la sanktuloj. Sekvis la tre atendita momento, la formulo de la sanktproklamo:

“... Beatos Ioannem XXIII et Ioannem Paulum II Sanctos esse decernimus et definimus, ac Sanctorum Catalogo adscribimus...”

“Ni deklaras kaj difinas Sanktaj la beatajn Johanon la 23-an kaj Johanon Paŭlo la 2-an kaj ni enskribas ilin en la liston de la Sanktuloj”.



La vortoj de Papo Francisko eniris en la historion. La fideluloj igis sian la Amen kantitan de la horo per longa aplaŭdo, levante la rigardon al tiuj grandaj tapiŝoj sur la fasado de la Baziliko kun la bildoj de la 2 sanktaj Papoj, kvazaŭ renovigante dialogon kun tiuj paŝtistoj, kiuj en la sama placo karesis infanojn, ĉirkaŭbrakis malsanulojn, premis manojn; benis sian fidelularon kaj kiuj nun al ili daŭre faras tion el la Ĉielo.

Sekvis la legado de la Evangelio, tiu de la dimanĉo, kiu fermas la paskan oktagon, kaj kiu, diris la Papo komence de sia prediko, fokusiĝas sur la “glorplenaj plagoj de la resurektinta Jesuo” (Joh 20, 19-31). La vundoj, kiujn Tomaso volis vidi, tuŝi por kredi. La plagoj de Jesuo, komentis Francisko, “estas skandalo por la kredo, sed ili estas ankaŭ konstato de la kredo”. Pro tio, li diris: “el la korpo de la resurektinta Kristo la plagoj ne malaperas, ili restas, ĉar tiuj plagoj estas la konstanta signo pri la amo de Dio por ni. Tiuj plagoj,” li aldonis, “estas nemalhaveblaj por kredi je Dio. Ne kredi, ke Dio ekzistas, sed por kredi, ke

Dio estas amo, mizerikordo, fideleco”.

“Sankta Johano la 23-a kaj sankta Johano Paŭlo la 2-a havis la kuraĝon rigardi la vundojn de Jesuo, tuŝi liajn plagitajn manojn kaj lian trapikitan flankon. Ili ne hontis pro la karno de Kristo, ili ne skandaliziĝis pro Li, pro lia kruco; ili ne hontis pro la karno de siaj samkarnuloj, ĉar en ĉiu suferanto ili vidis Jesuon. Ili estis du kuraĝaj viroj, plenaj je la Sankta Spirito kaj ili donis ateston al la Eklezio kaj al la mondo pri la boneco de Dio, pri lia mizerikordo”.

“Ili estis pastroj, episkopoj kaj papoj de la 20a jarcento, kies tragediojn ili konis,” diris Papo Francisko, “sed ili ne estis supervenkitaj. Pli forta, en ili, estis Dio; pli forta estis la kredo je Jesuo Kristo Elaĉetanto de la homo kaj Sinjoro de la historio; pli forta en ili estis la mizerikordo de Dio, kiu manifestiĝas en tiuj ĉi 5 plagoj; pli forta estis la patrina proksimeco de Maria”.

“En tiuj du viroj, kontemplantoj de la plagoj de Kristo kaj atestantoj de lia mizerikordo,” li aldonis, loĝis vivanta espero, kune kun neeldirebla kaj glorplena ĝojo. La espero kaj

la ĝojo, kiun la resurektinta Kristo donas al siaj disĉiploj, kaj kiujn neniu povas forpreni de ili. La paskaj espero kaj ĝojo, kiuj pasis tra la fandujo de la senvestigo, de la malplenigo, de la proksimiĝo al pekuloj ĝisekstreme, ĝis la naŭzo pro la maldolĉeco de tiu kaliko. Ili estas la espero kaj la ĝojo, kiujn la du sanktaj Papoj ricevis donace de la resurektinta Sinjoro kaj kiujn siavice ili abunde donacis al la Popolo de Dio, ricevante interŝanĝe eternan dankemon”.



Ĝuste “ĉi tiun esperon kaj ĉi tiun ĝojon”, meditis Francisko, “oni spiris en la unua komunumo de la kredantoj, en Jerusalemo. Komunumo,” li substrekis, “en kiu oni travivas la esencaĵon de la Evangelio, t.e. la amon, la mizerikordon, simple kaj fratece. Kaj ĝi estas la bildo de Eklezio, kiun la Dua Vatikana Koncilio atentis”. Sankta Johano la 23-a kaj sankta

Johano Paŭlo la 2-a “kunlaboris kun la sankta Spirito por restarigi kaj ĝisdatigi la Eklezion laŭ ĝia origina fizionomio, kiun donis al ĝi la sanktuloj dum la jarcentoj: ni ne forgesu, ke ĝuste la sanktuloj antaŭenigas kaj kreskigas la Eklezion. Per la ariĝo de la Koncilio Johano la 23-a elmontris delikatan obeemon al la Sankta Spirito, li lasis sin esti kondukata de la Spirito kaj li estis por la Eklezio paŝtisto, gvidantogvidata. Jen lia granda servado al la Eklezio: pro tio al mi plaĉas pensi lin kiel la Papon de la obeemo al la Sankta Spirito”.

“En la servado al la Popolo de Dio”, daŭrigis Francisko, “sankta Johano Paŭlo la 2-a estis la Papo de la familio. Li mem iam diris, ke li deziras esti rememorigata kiel la la Papo de la familio. Mi ŝatas substreki tion, dum ni travivas la iradon al la Sinodo pri la familio kaj kun la familioj, iradon, kiun li certe akompanas kaj subtenas el la Ĉielo”.

“Ke ambaŭ ĉi tiuj novaj sanktaj Paŝtistoj de la Popolo de Dio”, estis la fina preĝalvoko de Papo Francisko, “propetu por la Eklezio, por ke, dum la du jaroj de la sinoda irado, ĝi estu obeema al la sankta Spirito en la paŝtista servado al la familio. Ke ambaŭ instru al ni ne skandaliziĝi pro la plagoj de Kristo, pli kaj pli eniri en la misteron de la mizerikordo, kiu ĉiam esperas, ĉiam pardonas, ĉiam amas”.

Dum la ĝenerala aŭdienco de la 28a de Majo Papo Francisko, reveninta el Sankta Lando, petis pardonon pro la dividoj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ afliktas la gefratojn en Kristo. Kaj li petis preĝojn por la paco en la tuta Proksima Oriento kaj por tiuj, kiuj en tiu regiono esperas kontraŭ ĉiu espero.

LA PAPO PRI SIA VOJAĜO AL SANKTA LANDO


24–26.05.2014

“Akceli la plenan unuecon de la kristanoj kaj kuraĝigi la pacon estis la celoj de mia vojaĝo. Mi volis alporti vorton de espero, sed mi ricevis ĝin miavice! Mi ĝin ricevis de la gefratoj, kiuj esperas «kontraŭ ĉiu espero» (Rom 4,18)”, tiel parolis Papo Francisko, rakontante sian vojaĝon al Sankta Lando al la dekoj da miloj da fideluloj, partoprenantaj en lia unua ĝenerala aŭdienco post la reveno. La Papo memorigis sian ĉirkaŭbrakon en la Sankta Tombo kun Patriarko Bartolomeo, 50 jarojn post la historia renkontiĝo en Jerusalemo de

Papo Paŭlo la 6-a kaj Atenagoras: “Ni spertis la tutan amarecon kaj suferon pro la dividoj, kiuj ankoraŭ ekzistas ĉe la disĉiploj de Kristo, kaj tio multe dolorigas, multe dolorigas la koron. Ni ankoraŭ estas dividitaj”.

Sekvis la esprimo de celo (“Ni sentis la deziron resanigi la vundojn ankoraŭ malfermitajn kaj firme daŭrigi la iradon al la plena kunuleco”) kaj de la pardonpeto: (“Plian fojon, kiel faris la antaŭaj Papoj, mi petas pardonon pro tio, kion ni faris por akceli ĉi tiun dividon, kaj mi petas al la Sankta Spirito helpi

nin resanigi la vundojn, kiujn ni faris al la aliaj gefratoj”.



“Kun la amiko kaj frato Bartolomeo”, konfidis Francisko, “ni kundividis la deziron kune iri: Fari ĉion, kion de hodiaŭ ni povas fari: kune preĝi, kune labori por la ŝafaro de Dio, serĉi la pacon, gardi la kreaĵaron; ili estas multaj aferoj, kiujn ni havas komunaj. Kaj kiel fratoj ni devas antaŭeniri”.

Antaŭeniri ankaŭ en la irado al paco en Proksima Oriento. “Ĉi tiu kuraĝigo”, memorigis la Papo, “estis alia celo de mia vojaĝo. Kaj mi ĝin faris kiel pilgrimulo, en la nomo de Dio kaj de la homo, portante en mia koro grandan kompaton por la gefiloj de tiu Tero, kiuj de tro multe da tempo kunvivas kun la milito kaj kiuj rajtas ekkoni finfine tagojn de paco!”.

El tio fontis la instigo de la Papo al la kristanaj fideluloj lasi sin esti “ŝmirataj”, kun malfermita kaj obeema koro, de la sankta Spirito “por esti pli kaj pli kapablaj realigi gestojn de humileco, de frateco kaj de repaciĝo”. Kaj por fariĝi ‘metiistoj’ de la paco: “He, la pacon oni faras metiece” – aldonis Francisko. “Ne ekzistas industrioj de la paco, ne. Oni faras

ĝin ĉiutage, metiece kaj ankaŭ per malfermita koro, por ke venu la donaco de Dio”.

Retrairante la etapojn de sia vojaĝo, Francisko substrekis la sindevigon de Jordanio por la akcepto de la rifuĝintoj el la milit-regionoj, aparte el la “martirigita Sirio”, kaj la gravecon serĉi justan solvon por la israela-palestina konflikto: “Pro tio”, diris ĉi-koncerne la Papo, “mi invitis la prezidanton de Israelo kaj la prezidanton de Palestino, viroj de paco kaj



La kortuŝa ĉirkaŭbrako de la Papo, de rabeno Skorka kaj de ŝejko Abboud

pacofarantoj, veni en Vatikanon por preĝi kune kun mi por la paco”. (v. p. 35).

La penso de la Papo fine iris al la kristanoj persekutataj en tiu regiono kaj en la tuta Proksima Oriento, “kuraĝaj atestantoj de espero kaj karitato. Ni daŭre estu proksimaj al ili! Ni preĝu por ili kaj por la paco en Sankta Lando kaj en la tuta Proksima Oriento. La preĝo de la tuta Eklezio subtenu ankaŭ la iradon al la plena unueco inter la kristanoj, por ke la mondo kredu je la amo de Dio, kiu en Jesuo Kristo venis loĝi meze de ni”.

SUD-SUDANO: LA ESKAPO DE PASTRO RAIMUNDO

Kaŝita dum dudek tagoj en marĉejo kune kun 500 senhejmuloj. La misiistoj ne forlasis urbon Leer ĝis kiam la armeo atakis ĝin. “Mankis ĉio al ni, krom Dio kaj la solidareco de la popolo”

“Oni kuris niadirekten pafante al ni. Vi scias, la homoj, kiuj ne frapas ĉe via pordo por eniri... Ni aŭdadis la terurajn bruojn de la kugloj, kiuj konstante flugis super niaj kapoj”. Pastro Raimundo Rocha transvivis la plej malbonan momenton de sia vivo. Komence de la

jaro, ni menciis lian ateston: “Mi timas, sed mi restas kun la popolo”. Li ne volis forlasi sian mision en Leer (norde de Unity State), ekonomia centro de Sud-Sudano, tra kiu iras la petrolo, kiu signifas 98% de la ŝtata enspezo.

Pastro Raimundo, komboniana misiisto, ne volis foriri, volis resti en la urbo, sed ĉiutage la situacio fariĝis pli kaj pli danĝera: “La streĉiteco kreskadis, kaj same la timo. La civilaj homoj jam eskapis el la urbo”. La 29-an de Januaro, kvin malsamaj grupoj de policiistoj

kaj armeanoj atingis la misiejon por kapti la aŭtomobilojn; multaj el ili estis ebriaj. La hospitalo de Kuracistoj Sen Limoj, la domoj kaj la publikaj oficejoj jam estis forrabitaj. La 30-an de Januaro, post la matena preĝo, la misiistoj ankaŭ decidis eliri. Ene de la registaraj militistaroj, kiuj pretiĝas invadi la urbon, estis multaj homoj el Darfuro, kiuj normale, sed tute male ol la registaranoj, ne respektas la kristanajn misiejojn.



Pastro Raimundo Rocha, maldekstre

“Je la 9:45 matene ni foriris per 3 aŭtomobiloj; ni kunportis iom da manĝaĵoj kaj vestojn por uzi. En mian dorsosakon mi ankaŭ metis la Eŭkaristion, la preĝlibrojn, mian malnovan porteblan komputilon, kelkajn dokumentojn kaj statueton de Nia Sinjorino de Aparecida”. Pastro Raimundo estas brazilano, sed religiuoj el Italio, Usono, Etiopio, Togolando kaj religiulinoj el Ekvadoro, Kostariko kaj Sud-Sudano ankaŭ estis kun li: “Entute ni estis dek misiistoj, unu dioceza pastro, unu virino kun sia infano kaj unu juna geedza paro”. Sed laŭ la vojo multaj aliaj homoj suriris la aŭtomobilojn por eskapi kun ili. La transportiloj, plenaj je homoj, iras malrapide tra la vojoj meze de la savano. Unu veturilo sinkis en arenon. Kaj tial, por trairi la 28 kilometrojn ĝis la eta vilaĝo Beer, ili vojaĝis dum 4 horoj.

“La kristanoj de Beer akceptis nin varmkore kaj gastigis nin en siaj hejmoj, sed apenaŭ unu horon post nia alveno la infero estiĝis”. La voĉo de pastro Raimundo ankoraŭ tremas pro emocio, kiam li memoras tiujn terurajn momentojn: “Ni alportis ĉion, kion ni povis kaj diseskapis en la arbaron. Mi alportis 3 sakojn, kaj dum la kurado, mi multfoje falis. Post iom

da tempo mi jam ne plu povis daŭri kaj tial mi kaŝiĝis malantaŭ arbo. Mi pensis: ‘mi atendos ilin ĉi tie, ili mortigos min’. Pastro Ernesto, kiu eskapis kune kun mi, instigis min rekomenci la kuradon, sed mi estis tre laca! Subite aperis kvazaŭ mistere viro konata de mi: mi celebris lian edziĝon. Li etendis mantelon sur la teron por ni. Ni reprenis la spiradon; la viro prenis mian plej pezan sakon kaj ni rekomencis kuradi. Post nelonge ni ĉiuj haltis: mankis fortoj al ni. Ni kuŝis en loko plena je herboj inter la palmarboj”.

Kaŝe sidantaj, timantaj, tie ili restis dum 3 horoj, ĝis la 6-a vespere. La pafbruoj daŭre maltrankviligas la savanon, sed ili ne scias, kio okazas en tiu loko, kio okazis al iliaj kuneskaptaj geamikoj. Post la vesperiĝo du paŝtistoj venis kaj akompanis ilin al la vilaĝo.

“Fine ni renkontiĝis kun niaj geamikoj; ni estis ĝojaj. Nur la virino kaj ŝia filo mankis, sed oni diris al ni, ke ili ankaŭ transvivis kaj estis en alia vilaĝo. Tiam ni trapasis la nokton en kabano, plenterurigitaj”. La sekvan matenon, pastro Raimundo kaj la aliaj vekigis tre frue por serĉi rifuĝon en regiono pli sekura, en vilaĝo ĉe marĉejo: “Tie ankaŭ la popolo estis tre gastema. Viro akceptis nin en sia domo dum 20 tagoj. Ni dormis sur la grundo, ni trinkis akvon el la marĉejo kaj manĝis tion, kion oni sukcese kapti: hipopotamojn, krokodilojn aŭ bubalojn”. La tagoj pasis kaj la regiono ĉe la marĉejo fariĝis ia rifuĝejo. Pastro Raimundo kalkulis eĉ 500 homojn tie.

“Ni perdis ĉion: la veturilojn, la vestojn, la manĝaĵojn. Ni transvivis dank’ al la solidareco de la popolo. Ni manĝis malmulte kaj dividis kun ĉiuj la manĝaĵojn je dispono, sed ni neniam suferis malsaton. Katekizanto marŝis dum 2 tagoj por atingi nin kaj dividi kun ni la enspezon, kiun li akiris per la vendo de sia kaprino, kiun li vendis por prizorgi sian handikapitan filon”. Pastro Raimundo ricevis grandegan vivlecionon dum la travivado de tiu tre tragedia sperto: “Mankis ĉio al ni, krom Dio kaj la solidareco de la popolo. Ĉiutage je la 5-a posttagmeze ni celebris la Meson. Ni sciis, ke multaj homoj preĝis por ni tra la mondo. Pro tio ni neniam perdis la esperon”.

(Artikolo aperinta en Interreto kaj tradukita de Vitor Luiz RIGOTI DOS ANJOS)